



**1(174)
2020**

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Vesna Skaljer-Race (1911 - 2000), serbino

Adiaŭo

Kiel vin forlasi,
o maro bela!

Spegule se vi bluas,
hela,
aŭ en spiro se anhela
vi per forto via muela ruliĝas
dum la hor' kverela;
kiam vi aliras min
sen sci' orela,
per via fluo ŝtela,
vi estas,
maro,
ĉiam bela!

Ho,
kial esti tiom bela?

Dum en ardo vi, duela,
estas kontraŭ ĉio ĉiela
kaj per forta frap' martela
batas fulmo vin kruela,
maro,
vi diversnivela,
maro,
vi koleroŝvela
eĉ tiam, jes,
eĉ tiam ja vi estas bela!

Ne estu, maro, tiom bela!
De l' blu' mi vidis jam paŝtela
vin en danco tarantela;
per blanko ornamita vela;

per multnombra brilo stela;
per ondoj
kun la ŝaŭm' juvela –
vi estas,
maro,
ĉiam bela,
via bel'
senparalela!

Ho, vin forlasi,
belaj' fabela!

Iu ekkredas

Iu ekkredas
kompreni ilin
volas esti ilia kamarado,
ludi kun ili.
Ili respondas
ke ili estas tro aĝaj
por ludado.

Li transformiĝas en libron
kaj atendas surbrete
ke oni etendu la manon
je li.
Vane li atendas
kaj vermoj ekkonsumas lin.

Poste li fariĝas akvo,
por ke oni povu
refreŝiĝi per li.
Kaj oni elverŝas lin
en kanalon.

Eligiusz Dymowski. Zerwane kartki kalendarza. Kraków 2011
Forŝiritaj paĝoj el kalendaro.

Interparolo kun konkono

Mi volus scii, kio vere estas amikeco – ŝi diris – ne levante la okulojn enrigarditajn en verdan-blankan koloron de ondoj.

Ŝi ĝojis pro tiu vojaĝo. Ŝi sciis, ke kio ajn okazos, estos eksterordinara.

Ne, vi ne devas respondi – ŝi aldonis subite. Mi sen tio scias, ke amikecon oni ne povas priskribi. Ĝi ekzistas en ni. Ĝi estas nia senco, engluto de la freŝa aero, feliĉo, momento, al kiu, povas esti, oni sopiras... sendepende de la jarsezono. Amikeco estas nekontestebla forto, kiu alproksimiĝas... sopiro, kiu vekas en ni bonon kaj amon.

Viŝante salan akvon el la vizaĝo, kvazaŭ ŝi timus perdi iun aŭ ion, ekflustris mallaŭtete:

– Dankon!

Ŝi tuŝita neatendite de graco, plena de Silento revenis al sia mondo, portante en la manoj misteran aromon de la maro.

Klajpeda, 1998

Praarbaro

*Li venis ĉi tien, por morti, ĉar ĉio,
kion li amis jam mortis.*

Carlos Fuentes

Neniu konis pli bone tiujn arbojn ol Jozefo Siemieńczuk, nepo de olda arbaristo Jakobo. Praarbaro estis lia vera Edeno, paradizo de libero, ensorĉita ĝardeno de la feliĉo, sekretoj kaj revoj. La plej volonte li enlasadis en ĝian profundon frumatene, murmurante ĉe tio subnaze siajn elprovitajn preĝojn, kvazaŭ ortodoksa popo.

Eĉ bestoj al kutimiĝis al liaj oftaj vizitoj. Malpacience ili atente aŭskultis bone konatajn paŝojn, ĉar bone sciis, ke li ĉiam pri ili memoras subĵetante kun rideto iom da furaĝo. Li sentis sin la vera gardisto de la pratempa naturo, savita mirakle antaŭ buldozoj de la nuna civilizo. – Sufiĉe suferis arboj. Se ili povus pri tio paroli... se povus... – li ripetadis per la raŭka voĉo – la mondo ekvidus iliajn verajn vizaĝojn kaj vundojn pikitajn per stulteco kaj senpenso.

De iu tempo komencis lin viziti iaj strangaj sinjoroj en garnituroj kaj silkaj kravatoj. Ili klarigis, ba, eĉ timigis, svingante antaŭ la nazo per la pugnoj. Jozefo tamen restis ŝtonfirma. Li ne povis ja perfidi kaj forlasi, pro nenio, la amatan praarbaron. Ja estis tuta lia vivo.

Iun tagon li ne revenis al sia ligna kabano, kiun heredis post antaŭuloj, preskaŭ fine de la vilaĝo. De la buŝo al la buŝo pli kaj pli ofte disiradis klaĉoj, ke eble oni lin mortigis aŭ li pendumis sin pro la soleco, kaj eble freneziĝis kaj iris ien for, al blankrutena flanko.

Printempe, kiam degeliĝis neĝoj, trovis lin hakistoj en la eno de malnova, dika abio, en kiu li trovis kaŝejon, kaptita subite per forta kora paroksismo. Li videble preferis morti inter proksimuloj. Delonge li ja ne fidis al la nova mondo.

Białowieża, 2009

tradukis Lidia Ligeza

Maria Juskiewiczowa. Czarodziejski imbryczek . Bańnie i legendy japońskie.
La magia tekruĉeto. Japanaj fabeloj kaj legendoj.

Matsudaira Masatsuna Aleo

Antaŭ longa tempo loĝis en Nikko iu daimio je la nomo Matsudaira Masatsuna. Li ne estis riĉa, sed la fiero neniam permesis al li, eĉ en la plej granda bezono, peti helpon de iu.

Iun fojon oni komencis konstrui templon en ĉirkaŭaĵo de Nikko. Oni elektis negrandan placon, al kiu kondukis la larĝa vojo. Kiam ekaŭdis pri tio daimioj, venis kun malavaraj donacoj. Sennombraj statuoj de dioj, ŝtonaj lanternoj kaj sonoriloj plenigis veturilojn, kiuj en longa vico tage kaj nokte ruliĝis tra la vojo.

Neunu el noblaj sinjoroj fieris pri tio, ke danke al riĉaj donacoj, lia nomo por ĉiam restos en la memoro de posteuloj. Nur Matsudaira povis nenion oferi, do riĉaj princoj rigardis lin malestime kaj deturnadis sin de li eĉ tiam, kiam li genuis ĉe la ŝtonaj sojloj de la templo. Daimio tre suferis pro tiu kaŭzo kaj serĉis konsolon en preĝo.

Iun tagon li decidis forlasi sian familian landon kaj iri en la vastan mondon. Li ascendis al la monteto por per la lasta rigardo adiaŭi Nikko kaj ĝiajn belajn ĉirkaŭaĵojn. Subite lia rigardo falis sur la vojon, sur kiu svarmis homoj. Ili marŝis lacaj kaj elĉerpitaj pro la longa pilgrimado. Kaj tiam al la kapo de daimio venis iu penso. Jam la venontan tagon li komencis labori. Frumatene li portis mal-supren el najbaraj montoj arbetojn de japana cipreso kaj plantis ilin sur ambaŭ flankoj de la vojo. Potencaj princoj priridadis lin kaj mokis de lia laboro asertante, ke ĝi estas entute nebezona.

Pasadis la jaroj. La kapo de Matsudaira kovriĝis per grizo, la vangoj kaviĝis, la okuloj perdis brilon, kaj li kontinue plantis kaj plantis arbetojn.

Iun tagon, kiam jam plimulto da vojo estis kovrita per la sava ombro, oni trovis daimion ĉe piedoj de malgranda ĵus plantita arbo. Oni enterigis lin sur la tereno apartenanta al la templo.

Pasis tricent jarojn. Kelkfoje la fajro detruis la templon. Detruigis donacoj de riĉaj daimioj. Nur Matsudaira Masatsuna Aleo transdaŭris jarcentojn.

Ĉiujare nekalkuleblaj amasoj de pilgrimantoj el tuta Japanio rapidas por admiri imponan aleon, kiu etendas sur spaco de tridek kvin kilometrojn kaj omaĝi memoron de daimio, kiu per longa kaj pena laboro konstruis por si tiun vivantan monumenton.

tradukis *Marta Michałowska*

Saĝo de japanaj proverboj

Devenante el indigplanto, bluo estas pli blua ol indigo.

Ju pli vi diligentas, des pli vi progresos.

Lia disĉiplo jam superas lin.

Konatiĝo estas komenco de disiĝo.

Ĝis la disiĝo ni bone harmonie vivu.

Falu sep fojojn, ekstaru ok.

Kiam la karaktero de viro ne klaras al vi, rigardu siajn amikojn.

La bambuo, kiu fleksiĝas, estas pli forta ol la kverko, kiu rezistas.
Rapida rimedo: malrapida sed sen paŭzo ...
Tiu, kiu volas grimpi, inventas la ŝtupojn.
La edzo kaj la edzino devas esti kiel manoj kaj okuloj: kiam la mano doloras, la okuloj krias, kaj kiam la okuloj krias la manoj sekigas la larmojn.
La suno ne scias bonon, la suno ne scias malbonon; la suno lumigas kaj varmigas ĉiujn egale.
Eĉ la plej longa vojaĝo komenciĝas per unu paŝo.
Estas pli bone esti malamiko de bona persono ol amiko de malbona persono.
Malĝojo similas ŝiritan robon: vi devas lasi ĝin hejme.
Neniu stumblas kuŝante en la lito.
Afabla vorto povas varmigi tri vintrajn monatojn.
Kontrolu sep fojojn antaŭ pridemandi personon.
Faru ĉion eblan, lasu la reston al la celloko.
Troa honesteco limas stultecon.
Foje la folio sinkas, sed la ŝtono flosas.
Venko apartenas al iu, kiu atendas duonhoron pli ol sia kontraŭulo.
Feliĉo venas al la domo, kie ili ridas.
Malvarman rizon kaj malvarman teon oni povas toleri, sed ne malvarmajn rigardojn kaj vortojn.
Infano de kuracisto mortas ne pro malsano, sed pro medikamentoj.
Se vi malamas iun homon, lasu lin vivi.
Lotuso elkreskas el ŝlimo.
Traktu ĉiun maljunulon kiel vian patron.
Insekto du centimetrojn longa havas unu centimetron de animo.
Riĉulo kaj cindrujo fariĝas pli malpuraj, dum ili amasiĝas.
La voĉo de ĉiuj estas la voĉo de Dio.
Esti amata signifas esti malhelpata.
Estas la tempo por timo, kiam la tiranoj ŝajnas kisi.
Memoru dum via tuta vivo tiujn, kiuj donis al vi salon.
En la rikolta sezono eĉ rato havas sep edzinojn.
La lavistino scias la difektojn de la vilaĝo.
Rigardu la patrinon, antaŭ ol vi fianĉiĝas al la filino.
Ĉe la unua glaso: homo trinkas vinon; ĉe la dua glaso: vino trinkas vinon; ĉe la tria glaso: vino trinkas homon.
Gardu etan sumon, aŭ vi poste suferos per eta sumo.
Ne pensu, ke ĉiam estas la gepatroj kaj mono.